



# La Kolombo de Paco

4-a de junio 2021, numero 1

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova



## La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) estos la ĉefa esperantista aranĝo de 2021

■ Fernando Maia Jr.

■ Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko



Dankon pro via aliĝo ĉe <https://vk.esperanto.net/>! La kongresa kuriero *La Kolombo de Paco* estos nia ĉefa komunikilo pri tio, kio okazos kaj okazas pri la 2-a VK, kaj ĝin ricevas ĉiuj aliĝintoj, krom aliaj interesataj abonantoj: <https://vk.esperanto.net/kuriero>. Malsame ol aliaj kongresaj kurieroj, *La Kolombo de Paco* aperas ne nur dum la kongreso, sed ankaŭ antaŭe. Ĝia nomo omaĝas al la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido kaj kompreneble la kongresa temo “Paco kaj konfido: universalaj valoroj”. Krom la kuriero, interesatoj ankaŭ bonvenas abonati la Gazetarajn Komunikojn de UEA (<https://uea.org/aktuale/komunikoj>) kaj legi la revuon *Esperanto*, kiuj ankaŭ informas kaj informos pri la 2-a VK. La malferma artikolo de la junia numero jam donas unuajn ekskluzivajn informojn pri la programo, kiel la atendita momento kun la kreinto de la fikcia lingvo Dothraki, David Peterson, de la furoraĵo *Ludo de Tronoj*, kiu jam confirmis akcepton! Kaj ni ne forgesu: la kongresa kuriero estas de la kongresanoj. Ĉiuj bonvenas kontribui.

Karaj, ni salutas vin ĉi-tie, sur la paĝoj de *La Kolombo de la Paco*! Ni planas aperigi ĝin simile al la *Festiva Kuriero* de MondaFest’ 2020. Tamen ni supozas, ke estos ankaŭ multaj novaj interesaĵoj kaj agrablaj surprizoj.

Kiel jam skribis Fernando Maia, vi estas bonvenaj kontribui pri viaj spertoj, ideoj, fari anoncojn pri la venontaj eventoj, ĉu kadre de la 2-a Virtuala Kongreso, ĉu ĉirkaŭ ĝi. Eblas ankaŭ sendi la informojn pri la eksterretaj eventoj, kiuj parte rekomenciĝos en la venontaj semajnoj. Kontribui povas iu ajn esperantisto: se vi partoprenas ion gravan, interesan aŭ amuzan en nia Esperantujo, ne hezitu kontakti nin. La kontribuoj estu sufiĉe koncizaj, maksimume ĝis 300 vortojn longaj. Tamen, se estas iuj pli longaj kontribuoj, estas tute en ordo, ni povas diskuti pri ilia publikigo en la Reta Revuo (<https://revuoesperanto.org>). Foje eblas publikigi beletrajn kontribuojn. Ankaŭ ege bonvenas fotoj kaj bildoj. Bv. sendi ĉion al la retroŝtadreso [redakcio@revuoesperanto.org](mailto:redakcio@revuoesperanto.org)





## Partoprenu la Virtualan Kongreson kaj mojosigu ĝian junularan programon!

Kadre la VK okazos bunta junulara programo, malonge JuPo, prizorgata de teamo de volontuloj.

Se vi estas membro de TEJO/UEA, vi povas aliĝi al la kongreso senpage ĝis la 4-a de julio 2021.


Venu partopreni la plej grandan Esperanto-aranĝon de la jaro kaj mojosigi ĝian programon!

### Kiel kontribui? Vi povas fari tion per...

- ✂ kultura aŭ arta prezentaĵo
- ✂ mallonga filmeto pri via loĝloko (maks. 10 min.)
- ✂ metu vian urbon aŭ vilaĝon sur la mapon de la virtuala Titanika ekskursita tago!
- ✂ vojaĝigo en fikciaj lingvoj aŭ mondoj
- ✂ ĉu vi sciis ke Belfasto gastigis la filmadon de *Ludo de Tronoj*?
- ✂ prezentado de via klubo aŭ asocio
- ✂ prelego aŭ ateliero
- ✂ diskutrondo
- ✂ kvizo
- ✂ ludo

Uzu la formularon por la kerna programo (vd. anoncon pri tio en tiu ĉi paĝo) aŭ kontaktu nin ĉe [jupo@vk.esperanto.net](mailto:jupo@vk.esperanto.net) por aliaj programeroj (ajnatempe) ĝis la 14-a de junio.

Dum la ferma tago de la kongreso okazos la talentokonkurso Mondovizio:



Montru vian talenton per poemo, kanto, ĵonglado, sporta spektaklo aŭ alia aktivaĵo laŭ via kreemo. Via filmeto daŭru maksimume tri minutojn kaj estu sendata per WeTransfer al [jupo@vk.esperanto.net](mailto:jupo@vk.esperanto.net) ĝis la 21-a de julio.

En la mesaĝo menciuj per kiu nomo vi ŝatus esti prezentata en Mondovizio kaj kiun landon vi reprezentas – ankaŭ fikciaj nomoj kaj landoj bonvenas.


Ni antaŭĝojas vidi vin en la Virtuala Kongreso!

Vi ankaŭ povas spekti filmeton pri la temo ĉe jutubo: [https://youtu.be/\\_3Wz25IEO\\_A](https://youtu.be/_3Wz25IEO_A)



## Proponformularo por programeroj de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto

Formularo por la kerna programo de la 2-a VK (plenigu ĉi-tie: <https://mallonge.net/e2>). La kerna programo gastigas diversajn programerojn kiel prelegoj, paneloj, debatoj, aŭtoraj momentoj, libroj de la jaro, artaj kaj kulturaj prezentoj k.s. Formularo por aliaj programeroj ekster la kerna programo disponeblas aparte (ekzemple, por la Virtuala Movada Foiro). Rapidu: la fermo de la formularo estas planita por la 14-a de junio 2021. Nepras, ke proponantoj kaj partoprenantoj de la programero estu ĉiuj aliĝintaj al la 2-a VK: <https://vk.esperanto.net>. Antaŭdankon pro via interesiĝo!



## Legpretas la 43-a numero de la afrika bulteno


La bulteno mem estas senpage elŝutebla per <https://mallonge.net/e3>



## Internacia Jaro de Paco kaj Konfido

La 12-an de septembro 2019 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis 2021 Internacia Jaro de Paco kaj Konfido. Vi povas trovi la tekston de la rezolucio, kiun akceptis la Asembleo, en la oficiala retejo de Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

<https://mallonge.net/dq>





## AMO 73 venis al sukcesa fino

■ Stefan MacGill

Tiu Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) okazis la 30-an de majo 2021 kunlabore kun nia ekonomia kaj komerca Faka Asocio, IKEF. La AMO-programo kunlaboris kun multaj Fakaj Asocioj tra la jaroj: ILEI, IFEF, ISAE pere de KAEST, kaj la siatempa Monda Turismo. Nun, ni aldonas kunlaboron kun IKEF. Dua atingo estas la aldono de plia lando al la AMO-programo, ĉar la seminario estis lerte gvidata de s-ro Yas Kawamura el Japanio. La seminario mem pere de Zoom altiris 53 partoprenantojn, kun samtempe viva elsendado en la kanalo *UEA Viva* ĉe Jutubo, danke al la kunlaboro kun Luis Obando en Kolombio, kaj kunlabore kun s-ino Park el Koreio, por plusendado per VooV, sistemo vaste uzata en Ĉinio kaj ĝenerale Azio. Do, almenaŭ 80 partoprenantoj, kredeble pli! Laŭ nia scio, nun okazis la unua virtuala AMO-seminario dissendata pere de tri distribu-sistemoj. El inter la landoj de partoprenintoj, estas rimarkeblaj la sekvaj: Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉinio, Germanio, Hispanio, Hungario, Israelo, Italio, Japanio, Kanado, Koreio, Nepalo, Tanzanio, Ukrainio, Usono kaj Vjetnamio.

Vidu ekrankapton de dudeko da partoprenintoj sur la sekva paĝo.

Ligilo al la prelego de Fabricio Valle el Brazilo:

<https://www.slideshare.net/fabriciovalle/prelego-rusio>

Pliaj programeroj kaj grupfotaj troveblas ĉe:

[www.ikef.info](http://www.ikef.info)



## Eŭropo kaj la necesa rejunigo pere de AMO

■ Stefan MacGill

Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo: jen la defia kaj gravega temo de la 74-a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). La alfluo de pli junaj membroj tra la cetera mondo bele progresas, sed la komunumo en Eŭropo restas persiste aĝiĝanta kaj la membraro falanta. El la 15 plej fortaj landoj, 14 montris falojn – eĉ signifajn. La sola escepto estas Hispanio. Enkonduko por tiu seminario jam ekzistas, kaj disiris kun EKO-komuniko. Ĝi entenas rekomendojn al UEA, TEJO, ILEI, IKEF, al la Landaj Asocioj kaj la Eŭropa Komisiono de UEA. La Seminario okazos en la 22-a de julio (ĵaŭde).



## Kvina Forumo por ILEI-Gvidantoj

La kvina Forumo por ILEI gvidantoj okazos sabaton, la 5-an de junio 2021, je la 10:00 UTC kaj havos la temon "Kiel junigi nian membraron?". Ĝi okazos virtuale per Zoom. Kiel ĉiam, ĉiuj estas bonvenaj.



Afrikaj sekcioj viglas, du nordiaj sekcioj endormiĝas... Mankas detala statistiko pri la meza aĝo de niaj membroj, sed tutcerte ĝi estas alta. Tamen nia Movado bezonas kaj bezonos instruistojn. Ni pensu pri la estonteco, ni esploru kunlaboron kun TEJO.

Trovu alirdetalojn ĉe:

<https://eventaservo.org/e/0489da>



## Aperis la junia numero de la revuo Esperanto

La enhavisto de la junia numero:

- 123 | 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto: la ĉefa esperantista aranĝo de 2021
- 126 | La ĉina Esperanto-Movado antaŭ la Dua Mondmilito
- 128 | Klimato kaj Komercio
- 129 | Oficiala Informilo
- 130 | Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2020
- 138 | Esperanto en universitatoj: Interkultura komunikado kaj Esperanto

- 139 | Landa agado: Jarkunveno de EAF
- 139 | AMO: AMO kulminas en kongresoj
- 140 | Faka agado: Ankaŭ Rotary parolas Esperante
- 141 | Afriko brilas: Afrika monato Vikimedio 2021
- 142 | Esperanto en universitatoj: Spuroj de Armand Su, el la ĉina urbo Zaozhuang
- 143 | Historio: La fenomeno Samodaj
- 143 | Forpaso





## Aliĝu al Nitobe-Simpozio 2021 pri la temo "Lingvo, Konflikto kaj Sekureco"

La Nitobe-Simpozion, de la lundo la 26-a ĝis la mardo la 27-a de julio 2021, organizas la Universitato de Ulstero kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kun la financa subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF). Pro la nuna situacio la Simpozio okazos virtuale. La laborlingvoj de la evento estos la angla kaj Esperanto kun samtempa interpretado.



La Simpozio 2021 esploras kvar ĉefajn kampojn kun nuntempa graveco al la temo:

- ✂ Lingvopolitiko en Nord-Irlando kaj la sekvoj por la dividado de la povo en konfliktantaj socioj
- ✂ Lingvo kadre de sekureco kaj konflikto-solvado en Eŭropo
- ✂ Lingvo en humanecaj krizoj kaj anticipa packonstruado mondscale
- ✂ Antaŭenpuŝi lingvan justecon

Aliĝilo kaj programo estas ĉe: <https://esfacademic.org/eo/nitobe-simpozio-2021>.

Organizantoj: Michele Gazzola, Angela Tellier, Mark Fettes, Humphrey Tonkin.

Interpretistoj: Duncan Charters kaj István Ertl.



## Esperanta Vikipedio "Unesko 2021"

Ĝis la 30-a de junio! UEA kaj Esperanto kaj Libera Scio malfermas la projekton de Esperanta Vikipedio "Unesko 2021" omaĝe al la 75-jariĝo de Unesko. Ĝi estas reta redakta maratono, kiu okazas ankaŭ kadre de la kampanjo 300 000, simile al la Afrika Monato, kiun ankaŭ UEA apogis en majo. La nuna junia konkurso celas plimulti la enhavon en Esperanto pri Unesko kaj tiel disvastigi ĝiajn valorojn kaj idealojn. Ĝia formo estas reta artikol-redakta konkurso. Partoprenantoj zorge konsultu la regulojn. Poste kreu aŭ plibonigu artikolojn rilatajn al Unesko kaj aldonu ilin al la listo. La verkado estas ĉefe por helpi al Vikipedio en Esperanto, al libera edukado, al Esperanto kaj precipe al disvastigo de valoroj kaj idealoj de Unesko. Tamen premioj estas! Al palpeblaj premioj apartenas specialaj insignoj al via uzanto-paĝo kaj jenaj premioj:

- ✂ 1-a premio: donackarto valora 60 € + Unesko-libro + Unesko-Kuriero
- ✂ 2-a premio: donackarto valora 35 € + Unesko-libro + Unesko-Kuriero
- ✂ 3-a premio: donackarto valora 10 € + Unesko-libro + Unesko-Kuriero
- ✂ 4-a premio: Unesko-libro
- ✂ 5-a premio: Unesko-Kuriero

UEA kaj ELiSo deziras al ĉiuj partoprenantoj sukceson! Antaŭdankon pro via helpo diskonigi tiun novaĵon!

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Projekto:Unesko\\_2021](https://eo.wikipedia.org/wiki/Projekto:Unesko_2021)



**Nova afiŝo por la Esperanto-Tago 2021**

Jen la afiŝo jam pretigita por la Esperanto-Tago en la 26-a de julio, 2021. UEA nun aktive arigas tradukojn por nacilingvaj versioj de la afiŝo, tiel ke landaj kaj lokaj asocioj ricevu de UEA uzeblan afiŝon, por eluzo en retejoj aŭ per fizika elprintado. Almenaŭ deko da lingvaj tradukoj jam alvenis.

### Jen la tradukendaj materialoj:

Mondaj solvoj por mondaj problemoj  
**Esperanto**  
 por monda kunlaborado  
 Lernu Esperanton, la mondan lingvon, por kunlaborado kaj paco

Bv. plie doni konvenan enlandan kontakt-adeson aŭ retejon.

La afiŝon kreis, kiel ĉiujare, la brito Peter Oliver. Morotras la arigado de tradukoj Renato Corsetti.

